


# LA VERDA LUPEO – FENIKSO




N-ro 36 | 1977/1 Januaro | Oka jaro


---

## Informilo de la unuiĝintaj ELF – AREK – Kluboj

**ELF:** Esperanto Ligo Filatelista

**AREK:** Amika Rondo de Esperantaĵ – Kolektantoj

---

*Karaj geamikoj,*

mi transprenis la redaktadon de nia informilo, ĉar sinjoro Ivar Paulsson min petis pro tio. El materialo, kiun mi trovis sub miaj manoj, mi preparis la nunan numeron, kaj mi esperas, ke la enhavo kontentigos vin. La sekvontan numeron mi certe jam povos kompili el viaj kontribuaĵoj, kiujn mi esperas ricevi de vi.

Ni kontinue daŭrigu la laboron de ELF kaj de AREK.

Okaze de la jarŝanĝo permesu min deziri al vi ĉiuj sanon, feliĉon kaj sukceson en via kolektado via nova redaktoro





Rudolf Burmeister
DDR-90 Karl-Marx-Stadt
Wilhelm-Wolff-Str. 1
p.k. 30-95-39

## Nova adresaro de niaj membroj

Per la sekvonta numero ni intencas eldoni al niaj membroj adresaron. Ankaŭ ni informos, kion niaj membroj kolektas, se eblas, trovi tiajn informojn en malnovaj adresaroj. Mi, via novbakita redaktoro, afable petas vin, sendi tiajn informojn al mi, por ke mi povu laŭeble post ĉiu adreso indiki viajn specialajn kolektatajn objektojn.

*LR*

☆

## Nia stampobanko plene funkcias!

Kiel konate, nia membro kaj vicprezidanto Werner Heimlich, D-304 Soltau, Fröbelstr. 4 prizorgas nian stampobankon. Li havas en la banko amason da poŝtaj E-stampoj, kiujn vi povas aĉeti. Sciigu al li vian mankoliston. Post interkonsento vi ankaŭ povus vendi al la banko viajn duoblaĵojn kaj novaĵojn.

*LR*

☆

## Nia glumarka servo

Pri ĝi okupas nia membro Gaston Tremon en Francio. Sendu al li informojn kaj specimenojn pri novaj glumarkoj. Li kompilas listojn pri ili kiujn ni publikigos en nia informilo.

*LR*

☆

## Novaj poŝtaj stampoj pri Esperanto

Por povi regule kaj fidinde informi pri ili estus necese, ke vi tuj informu min pri novaperintaj stampoj. Kiel vi scias, mi ankaŭ prilaboras la stampokatalogon, kaj tial viaj informoj estas utilaj por ni ĉiuj.

*LR*

☆

## PRAGA 78




En la jaro 1978 la ĉefurbo PRAHA denove gastigos la TUTMONDAN EKSPOZICION DE POŜTMARKOJ. Tiu ekspozicio ĉiujare okazas en alia lando, sed ĝis nun nur la organizantoj de tiu ekspo en PRAHA uzis Esperanton. 1962: pm kun esperantlingva enskribo, kaj 1968: pm-folio kun enmeza talono. Kaj ne nur sur pm ni renkontis Esperanton en tiuj ekspozicioj: ankaû en la ejoj ni vidis Esperanton en varbaj sloganoj.

Krome trovis lokon plej altnivelaj filatelaj ekspozaĵoj pri Esperanto en la konkura vico de la ekspozicioj. Kaj tiuj ekspozaĵoj rakontis al centmiloj de vizitantoj pri la internacia lingvo. Jen do la vera signifo de nia kolektado: propagandi nian lingvon konkrete k kvalite. En tirkestoj kaj albumoj niaj kolektoj putras. Montru, kion vi havas! Sed kvalite, kiel tion scipovas fari junaj belaj fraûlinoj, kaj tiel vi akiras novajn amikojn al nia movado. Vidu i.a. la senlacan, mallaûtan kaj modelan laboron de nia amiko Bartoŝik en PRAHA, mi pensas, ke la atingitaj filatelaj rezultoj por Esperanto en CSSR grandparte estas rezulto de lia modela laboro.

Niaj amikoj en CSSR planas en la oficiala kadro de la PRAGA 78 internacian renkontiĝon de E-filatelistoj. Do, jam nun planu vian viziton, kion vi certe ne pentos!

*LR*


La bildo supre montras Esperant-tutaĵon el Hungario.

## Pri la "poŝtmarkoj" de FUJEIRA (kaj OMAR?)

Nia prezidanto sinjoro Paulsson, kiel komisiito por pm de UEA ricevis "provpreson" kaj klarigan leteron de al mi ne konata persono. Prunte li peris ambaŭ objektojn al mi. Tiel mi havas eblecon, pli detale vin informi pri la tuto. Tamen la tuta afero restas (almenaŭ por mi) nebuloza kaj neklara. Eble vi trovas ion pli konkretan en la klarigo, kiun originaltekste mi jen prezentas al vi:

"La faksimilo estis ja planita p.-marko eldonota en Fujeira. Lastmomente, en 1974, ni dubis pri la sincereco de la firmao en Beirut, kaj mi malakceptis. Sed unu provekzempleron mi ricevis. Tiu estas la "patrino" de la faksimilo. Mi presigis 2000 ekzemplerojn. Poste poŝtmarka pograndisto interesiĝis, kaj li ricevis 100 000 ekzemplerojn por vendado al la mondo, ne al esperantistoj do. De tiu dua eldono mi ricevis 3000 Mi kunsendas unu, kiu kostas 5 d.kr. La diferenco estas, kiel vi vidas, la preso malsube (?). Laŭ filatela vidpunkto alia p.marko do. Mi enmetas por prunto aŭ aĉeto ion tre interesan, nome provpreso de la faksimilo. Mi estis tiom bonŝanca trovi ilin en la presejo. Kaj mi ricevis ilin senpage. Ekzistas 80 tiaj, eĉ en kvar diversaj koloroj. Ili estas nepageblaj. Mi klarigis en "Horizonto". Filatelistoj bone konas la valoron. En la granda filatela ekspozicio Hafnia en Kopenhago en pastinta monto mi vidis tiajn . . . Mi pagis konsiderindan monsumon por efektivigi la eldonon de la p.-markoj . . ."

Kaj jen la priskribo de la "provpreso", kiun sinjoro Paulsson ricevis:




1: 15 Dh Portreto de
Dro L.L. Zamenhof
1859–1917
LA KREINTO DE ESPERANTO

2: 35 Dh Portreto de
HECTOR HODLER
1887–1920
LA FONDINTO DE UEA

3. 50 Dh Portreto de PROF Dro IVO LAPENNA
LA PREZIDANTO DE UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO

4. 1 R1 Bildo de la "LA SANKTA BIBLIO"

5. 2 R1 Bildo de "LA NOBLA KORANO"

6. 3 R1 Bildo de "REKTORIKO" (de Ivo Lapenna)

La provpresa ekzemplero estas nedentumita kaj negumita folieto. Sur ĝia dorsflanko troviĝas fuŝitaj presprovoj kaj sur la dekstra kaj mal dekstra marĝenoj la vortoj "ESPERANTO", supre estas presita "LA INTERNACIA LINGVO", sube en la dekstra angulo "DUA ELDONO" kaj: Mogens Larsen Bogtryk. Sub la markoj 4, 5 kaj 6 presita estas "faksimilo".

☆

Laû mia opinio la tuta estas nepoŝta presaĵo. Min interesas via opinio. Ĉu entute FIPCO permesas au rekonas la pm de FUJEIRA, OMAR, UMM AL QUIWAIN ktp?

Ni klopodu, sobre rigardi la aperaĵon. Certe al esperantistoj oni sukcesos vendi, sed ĉu spertaj filatelistoj akiros ilin por siaj kolektoj. Se jes, certe nur kiel kuriozaĵoj? La vorton havas vi . . .

*LR*

**Poŝtajn E-tutaĵojn eldonis:**

| | | | |
|---|---|---|---|
| Aústrio | 79 | Hungario | 50 |
| Brazilo | 59 | Liĥtenstejno | 39 |
| CSSR | 15 | Nederlando | 168 |
| Danzig | 44 | Pollando | 3 |
| Germanio | 24 | Sovetunio | 161 |

(Laû statistiko pri poŝtaj dokumentoj en kaj pri Esperanto de V. Vana, kiu enhavas ĉiujn variaĵojn de la materialo)

## Poŝtaj Esperanto-Tutaĵoj

Pri ili skribis nia membro Vana en CSSR:

Tutaĵoj ĝenerale estas kovertoj au poŝtkartoj, sur kiuj troviĝas enpresita poŝtmarko.

Esperanto-tutaĵoj estas tutaĵoj, rilatantaj al Esperanto ĉu tiel, ke la enpresita poŝtmarko havas tekston en Esperanto au temas pri Esperanto, ĉu tiel, ke la teksto sur koverto aŭ poŝtkarto estas presita en Esperanto (ofte ankaŭ samtempe en unu aŭ pluraj naciaj lingvoj).

Simplaj kovertoj kaj kartoj kun E-tekstoj sen enpresita poŝtmarko ne estas oficialaj poŝtaj dokumentoj kaj ne estas listigataj.

En la listo estas enkalkulitaj ĉiuj konataj variaĵoj. Ekzemple diversaj lingvoj krom Esperanto, poŝtkartoj normalaj au dentitaj, ŝanĝita nominalo de la poŝtmarko kaj tiel plu.

El la tuta nombro de 642 pecoj estas:

599 poŝtkartoj kun neesperanta poŝtmarko
37 kovertoj kun neesperanta poŝtmarko
1 aerogramo kun E-poŝtmarko de Austrio
5 poŝtkartoj kun E-pm (HU, AU kaj PO)

☆

## Rimarko de la redaktoro:

Estas konate, ke kelkaj el niaj membroj sukcese kolektas E-tutaĵojn. Nia membro Vana en Plzen eĉ preparis bonegan ekspozaĵon pri ili kaj jam gajnis medalojn per ĝi en filatelaj ekspozicioj.

La sama ankau komencis, prepari novan katalogon de tutaĵoj. Niaj Esperanto-filatelistoj jam delonge kaj sopirplene atendas ĝian aperon.

Ĉu Esperanto Sekcio ĉe komisiono de tema filatelio de Asocio de ĉeĥaj filatelistoj eldonos ĝin? Se ne, tiam nia klubo certe trovus solvon.

☆

## Novaj glumarkoj

Nia membro Radnai el Hungario sendis la jenajn novajn glumarkojn:

| | |
|---|---|
| Montreal 1976 | Plurlingva reklama glm-serio |
| Innsbruck 1976 | XII-a Vintraj Olimpaj Ludoj |
| Sojus-Apollo 1976 | Astronaûtoj ĉiam uzu lingvon Esperanto. |

*IR*

☆

## Frankotipo "EVOLUON"

Nia mebro Werner Simon en Usono per letero al la redaktoro skribas i.a.:

Mi trovis afrankstampon, kiu eble surhavas esperantan tekston. Uzita ĝi estas de Philips en Holando kaj montras en la reklamteksto la vorton "EVOLUON". Eble ĝi estas esperanta vorto, mi ne povas imagi ion alian.

Rimarko de la redaktoro:

Kiu povas klarigi la aferon kaj sendi fotokopion aû originalan pecon por prezenti ĝin en nia informilo?

Frankotipoj estas plenvalora filatela materialo por niaj kolektoj, ĉar ili prezentas samtempe stampon kaj poŝtmarkon. Mi trovis artikolon el la plumo de Werner Simon en gazeto el la jaro 1948 pri "La afrankmaŝinoj", kiu estas tre interesa. Per iu el la sekvontaj numeroj mi deziras konigi al vi la tre interesajn faktojn, kiuj pruvas, ke Universala Posta Unio oficiale rekonis uzadon de frankotipoj.

*LR*

☆

## Ĉu poŝtaj E-stampoj en San Marino kaj Ateno??

La redaktoro pri tio deziras sciigojn. Pensu pri tio, ke nur dokumentitaj fraktoj estas akcepteblaj.

*LR*

**Prezidanto** de la ELF/AREK-Klubo:

Ivar Paulsson, S-171 33 Solna, Algatan 3

Poŝtkonto: 51 57 85-4/I. Paulsson - Solna

Jarkotizo: 10 internaciaj respondkuponoj au egalvaloro. Sendu ĝin al la prezidanto.

**Redaktoro** de la kluba informilo:

Rudolf Burmeister, DDR 90 Karl-Marx-Stadt, Wilhelm-Wolff-Str. 1, p.k. 30-95-39

---

## Gravaj sciigoj:

Tiu ĉi numero estas la lasta, kiun ricevas tiuj membroj, kiuj ne renovigis sian membrecon per pago de la kotizo.

☆

Bonvolu ŝanĝi la numeron de la antaŭa informilo al 35, kaj tiun de la antaŭlasta al 34. Tiu ĉi informilo estas plenrajta posedanto de la numero 36! Ni petas pardonon pro tiu erara numerado.

☆

La publikigon de viaj anoncoj ni daŭrigos per la sekvonta numero. Sendu viajn dezirojn al l redaktoro.

☆

La plej freŝdata stampo estas tiu de la 6-a VEF en Budapesto. Uzita de decembro ĝis januaro.

☆

S-ro Hirsch sciigas, ke li akiris stampon de Postkongreso en Ateno kaj de Kreto. Mi dankas pro tiu informo kaj petas pluajn detalojn.

*LR*